13-a JARO, N-o 452. MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. APRILO 1937.

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO: 67, avenue Gambetta, Paris-20

Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris: Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zaĝreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT., bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

Kion fari por nia movado ?

La nova Jarlibro de nia organizo jam aperis, k kun ĝojo certe ĉiu membro konstatis, ke en iuj partoj de la mondo la membro-nombro kreskis. Ankaŭ la Plenum-Komitato mencias pri tio sur la unua paĝo de la libreto. Tamen ni certe ne rajtas malatenti, ke ree la nombra de la landoj, en kiuj membreco al S.A.T. estas malpermesita, pligrandiĝis. Tio estas timiga fakto, ne nur rilate al S.A.T., sed al la tuta laborista movado, ĉar en tiuj landoj la laboristaro, kiu penadas por pli homeca, pli justa socio, estas plene katenita k subpremata de abomena ŝovinista reakcio, nuntempe nomata faŝismo.

Kaj kiu kuraĝas diri, ke Portugalio restas la lasta lando, en kiu nia movado senrajtiĝis? La fakto, ke nia Laborista Esperantio perdis multe da regionoj, tre ĉagrenas nin, k konsciigas nin samtempe pri la regreso de nia tuta lab. movado, pri la regreso de la civilizo, ĉar en tiuj regionoj nun regas kruela hom-senhonoriga absolutismo, kiu degradas la homojn al senrajtaj sklavoj, uzeblaj por la rabemo de registoj k ekspluatistoj.

Ne estas miraklo, ke ankaŭ al la demokratiaj landoj blovas tiu vento naciisma. **Kiom longe la mondo konsistos el sendependaj nacioj, tiom longe la militemo de la unu infektos ankaŭ la aliajn.** La kontraŭfaŝisma propagando nun tie k tie fariĝas naciisma propagando. Tio okazas en preskaŭ ĉiuj medioj.

Nia SAT-movado liberigas la membrojn de malnoviĝintaj ideoj, precipe rilate la adoradon al nacia sendependeco. Gi ne faras tion per principa fundamento, sed per la praktika uzado ~e esperanto, kiun ĝi ebligas al siaj membroj. Ci tiuj membroj do, praktikantaj esperanton, fariĝos, konscie aŭ ne, mondcivitanoj, kiuj plej bone komprenas la reakcian sintenon de ĉiuj, kiuj montriĝas esti naciistoj. Pli ol iam antaŭe, S.A.T. estas nepre necesa, ĝiaj sennacieca strukturo k superpartieco faras ĝin imuna kontraŭ la ŝovinisma ondego nuntempe. Tiu imuneco ne povas ne transiri al ĝiaj membroj, kiuj certe ne estas sennaciuloj en la plena signifo de la vorto, sed kiuj tamen pro la praktikado de la Zamenhofa lingvo en la kadro de S.A.T. pli k pli liberiĝas el patriotisma pensado.

Kaj en kiu grado Zamenhof mem libeririĝis el tiu pensado? La 30-an de junio 1914 li skribis al la organizantoj de kunveno por fondo de Hebrea Ligo:

« Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar laŭ miaj konvinkoj mi estas **homarano** k mi ne povas ligi min kun la celado k idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, k ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta, ambaŭ naskas k subtenas unu la alian... »

Emfaze S.A.T. rajtas aserti, ke la ideoj de Zamenhof plej bone estas komprenataj k disvastigataj en **ĝia** movado. Kaj honto por la Nederlanda S.E.L.N. (Filio de I.S.E.), kiu atakas SAT-on pro tio, ke S.A.T. favoras al la likvido de sendependaj nacioj (1).

Gek-doj! precipe en la nuna tempo S. A. T. devas kreski, malgraŭ oportunismo ĉiuflanka. Ni iru kontraŭ la fluego, k ekde nun ĉiu membro de SAT, ĉiu abonanto de « Senn. Revuo » estu konstanta, plej energia propagandanto por la reala laborista esperanto-movado tutmonda, por S.A.T.

Mi estas konvinkita, ke ĉiu el ni jam varbis pli malpli da kamaradoj por la studado de esperanto. Tiu devo ĝenerale estas bone de ni komprenata, ŝed ĉu malpli gravas varbi la esperantistojn por nia **movado,** kiu realigas la plenan praktikadon de la lingvo? Per tiu praktikado la lingvo fariĝas movado, per tiu praktikado la membroj konsciiĝas pri la esenco de esperanto. De nun ĉiu SAT-ano varbu unu aŭ du esperantistojn por S.A.T. La solidaro al la Gek-doj en la terorlandoj postulas tion de ni, la ŝovinisma ondego vigligu nian aktivecon! Ne sufiĉas esti membro de iu organizo; ni estu laborantoj, propagandantoj.

Do, **antaŭ la Roterdama kongreso** la membronombro de S.A.T. estu duobligita (1). Jen plej taŭga respondo al la Gekdoj de I.S.E. k I.P.E., kiuj juĝis necesa meti nian movadon en la servon de iu partio politika k per tio grave malutilas la esencan, apartan karakteron de la laborista esperantismo. WELS.

(1) Prave K-do W. respondas al atako de SELN, kiu cetere tute ne estas motivebla, ĉar laŭstatute SAT ne okupas sin pri solvo de politikaj problemoj, k tia estas nekontesteble ĉi tiu punkto. Gi do nur nerekte, per la eduka vojo, povos *iomete* kontribui al la solvo de la naciproblemo, iom « favori » la likvidon de nacioj. Tamen, K-doj, kiuj ne emas akcepti tiamanieran solvon de l'naci-problemo aŭ ne kredas ĝin ebla sur tiu vojo, ili tute ne bezonas havi skrupulojn rilate SAT-anecon sian. SAT ne havas k ne devas havi politikan programon. — *Red.*

(1) Perspektivo niaopinie tro optimista, konsidere la mallongon de l'daŭro fiksita, sed kredeble W. aludas pri duobligo de la nombro da SAT-anoj en *Nederlando*. Tio ja estas tasko pli facila, sur la teritorio de la plej forta LEA.

Helpu malgrandigi nian libroprovizon !

Dank' al nia katalogo ĉiu abonanto de « S-ulo scias pri la ekzisto de bela, tre ampleksa libroprovizo el propraj eldonaĵoj de SAT. Sed relative nur malmultaj Gek-doj helpas al ni forkonsumi tiun ĉi grandan librostokon, kiu amasiĝas en nia deponejo. La libroj ja estas eldonitaj por disflugi tra la mondo, k ne por vivi malliberulan ekziston en la malluma angulo de stokejo...!! Manko de mono? Parte, jes. Sed ankaŭ, certe, manko de legemo ĉe kelkaj. Tamen, por bone finlerni esperanton, oni devas multe legi. Per sia literaturo ja **vivas lingvo.** Tion komprenis la antikvuloj, tion komprenis la monaĥoj. Kial do ni, progresema esp-istaro, ne komprenus ĝin? Anstataŭ donaci « municion » al SAT, kial ne mendi rekte tiun aŭ alian libron? (La prezoj restis **neŝanĝitaj** en francaj frankoj **devaluitaj**!) Ankaŭ la disvendo de nia librostoko estas ja grava helpo por « ŝtopi la Breĉon ».

Ni volas citi ĉiunumere kelkajn (nur kelkajn!) el niaj eldonaĵoj, komencante per tiuj, el kiuj ni posedas ankoraŭ obsede grandan stokon, k kiuj tamen **meritas esti legataj** (aliajn, ĉar el ili ni ne plu posedas multe da ekzempleroj, ni lasos flanke por mendontoj laŭ nia katalogo; kelkaj eĉ tute elĉerpiĝis laste, kiel « Zamenhof », « Ruĝa Stela », « Stato k Revolucio »). Hodiaŭ ni rekomendas al via atento:

FABELOJ (de Hermynia Zur Mühlen); alia titolo « Kion rakontas la amikoj de Peĉjo ». Jen ĉarmaj porinfanaj rakontoj, facil-stilaj, kun so-

cialista tendenco, kies legado neniun lacigos. Traduko el la germana.

POEMO DE L'PLUGISTO (originalo de *Hrima*). En versoj la aŭtoro prezentas la sangajn batalojn de l'bulgara kamparanaro kontraŭ la blanka teror-reĝimo. Esprimoplena k simplavorta poezio, memoriganta pri stelita ĉielo k lunlumo.

La prezo de l'volumetoj estas po 3 fr. frankoj.

POR ŜTOPI LA BREĈON

55. LISTO

Gek. Veenendaal, W. Graftdijk	...guld.	4.—
E. Eriksson, Stokholmo	...sv. kr.	10.—
Gopo, Stokholmo	»	10.—
J. Renoud, Montargis	...fr. fr.	6.—
Chavenon, Clermont-F.	»	6.—
N. Wolve, Delft	»	6.—
Z. Gilbert, Aix	»	15.—
14 335, Vieno	»	36.65
Erbaro, Paris	»	10.—



17a Kongreso de S.A.T.

Adreso de la O.K.K.:

por mono: K-do A. v.d. Pols, Hortensia-str. 17, Rotterdam Zuid, ĝiro 275 837;

por ĉio alia: K-do C. van Essen, Westerbeekstraat 57, Rotterdam Zuid, Nederlando.

4a Komuniko

Oficiala Akcepto: La urba estraro de Roterdamo oficiale akceptos la kongresontojn en la urba domo.

Specialaj Kartoj: La apartaj enirkartoj kostas:

a) por la Interfratiĝvespero 40 cendoj (por senlaboruloj 25) do ne 50 k 35 kiel menciite en marta « S-ulo »);

b) por la Solena Malfermo 50 c. (por senlaboruloj 35).

Tiujn kartojn oni jam povas mendi al sekr. aŭ kasisto (kun samtempa pago); ni ekspedos la kartojn en junio. Kompreneble tio validas nur por NEKONGRESANOJ. La aliĝintoj ne havos kromajn kostojn. SAT-perantoj! Kolektu en viaj rondoj la mendojn, tio multe faciligas nian laboron!

Ilustritaj Kartoj: La OKK eldonis ilustritajn kartojn pri Roterdamo kun esp. teksto. Ili jam nun estas akireblaj ĉe kasisto aŭ sekr. de la OKK. Prezo: 15 cendoj por 7 diversaj kartoj.

Loĝado: Klare menciu sur via aliĝilo viajn dezirojn rilate al loĝado!!

Vojaĝoj: La K-doj vojaĝontaj tra Belgio (vagonare), ĝuos 35 % da rabato! Ĉe la nederlandaj k anglaj fervojoj ni klopodas akiri la samon. En sekvonta « S-ulo » aperos detalaj komunikoj pri tio.

Por la O.K.K. C. van Essen, sekr.

TRIA LISTO DE ALIĜINTOJ

38-39. Gek-doj v.d. Horst; 40. K-do J. G. Raven, Rotterdam; 41. R. Fischinger, Hago; 42. A. Robijn, Rotterdam; 43-44. Gek-doj Van Aelst, Bruxelles; 45. K-ino M. van Essen, Wijdenes (Nederl.); 46. K-do G. Kalkman, Vlaardingen (Nederl.); 47. J. de la Place, Soissons (Francio); 48. J. Wouda, Rotterdam; 49. W. Slobbe, Gouda (Nederl.); 50. A. Wijnman, Hago; 51. T. Burnelle, Herstal (Belgio); 52. Bas Wels, 53. G. Verschoor, 54. K-ino A. Rebers, 55. K-do H. Pikaar, ĉiuj en Rotterdam; 56. F. ten Hagen, Amsterdam; 57. K-ino J. Weerman, Amsterd.; 58. K-do P. Krijt, Amsterd.; 59-60. Gek-doj v.d. Vlist, Rotterdam; 61. K-do A. W. de Vaal, Bussum (Nederl.); 62. K-do J. C. Majoor, Bussum; 63. K-do W. Schaap, Bussum; 64. K-do X 1 (17837), Germanio; 65. K-do X 2, Germanio; 66. K-ino H. Buis, Bussum; 67. K-do H. W. Alings, Amsterdam.

Interesa Sugesto

La O.K.K. por la 17a SAT-Kongreso kun intereso legis la sugeston de K-do 10 512 en la marta « S-ulo ». Efektive la K-do pravas dirante, ke estas dezirinde, ke ankaŭ tiuj regionoj, kie estas malmultaj SAT-anoj, estu reprezentataj en la kongreso. La Gek-doj en Polio, Finlando, Hungario, Svisio ktp. klopodu aranĝi kunvenon por priparoli la eblon delegi unu el sia rondo al nia kongreso. Se oni sukcesos en tio, ni 1e: firmigos la kontakton inter la K-doj tieaj k la ceteraj K-doj apartenantaj al pli fortaj movadoj; 2e: La vizito al la kongreso stimulos la delegiton al plua, denova freŝa klopodado en la propagando por SAT; 3e: Por la propagando, estus tre grave, se multe da landoj aŭ lingvaj regionoj reprezentiĝos en la kongreso.

La O.K.K. forte subtenas la sugeston k nepre instigas al la Gek-doj en tiuj landoj, el kiuj verŝajne neniu vizitos la kongreson, aranĝi tian kunvenon, ĉiuokaze klopodi reprezentigi sin en la kongreso. Por pruvi, ke ni opinias la aferon grava k efektive volas helpi en tio, la O.K.K. garantias al tiuj reprezentantoj **SENPAGAJN LOĜADON K MANĜADON DUM LA TUTA KONGRESO** k pretas **PAGI POR ILI LA VOJAĜKOSTON DE LA NEDERLANDA LIMO AL ROTERDAMO!**

Gek-doj, serioze pripensu la aferon k AGU! Nia 17a estu vere INTERNACIA! 1937 estas jubilea jaro, zorgu ni inde festi ĝin. Zorgu ni, ke en aŭgusto kunvenos laboristoj el kiom eble plej da lingvaj regionoj. Ni atendas la rezulton de viaj klopodoj!

Por la O.K.K. C. van Essen, sekr.

LETERVESPERO URTTEG. — Trafik- k transportlaborista Grupo organizos fine de aprilo leter-vesperon. Sendu PI, L, fotetojn, pri laborkond., vivkond., eksp. m., deĵortabelojn ktp al K-do *W. M. Kruyt*, Nic. Beets-str 26 b *Rotterdam (W)*, Nederlando. Resp certa.

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj

La franclingva LEA (F.E.T.) kongresis en Lille

F. E. T. kongresis en la ĉefurbo de Norda Francio. El proks. 1500 membroj partoprenis ĉ. 50 la kunsidojn; estis proks. 20 delegitoj, kiuj disponis pri la mandatoj de ĉ. 50 grupoj. La kongreso elmontris en siaj kvar laborkunsidoj, ke la unueco starigita en julio de l'pasinta jaro estas ankoraŭ tre malforte bazita. Ĉiu partopreninto povis palpe konstati, ke la ĝisnuna rezulto de l'unuigo estas neniel pozitiva, ke la laboro farita ĝis nun estas preskaŭ nula, k ke la pene akirita rezulto de unueca federacio sur la bazo de kompromiso k de statuto komune akceptita jam minacis nuliĝi en Lilo. Intrigoj de IPE-anoj k la senmaskigo de tiuj manovroj kreis netolereblan atmosferon, sed ankaŭ malfermis la okulojn al multaj, kiuj havis tro grandan fidon en la sincero de iuj personoj. Imagu, ke oni preparis atakon kontraŭ la kasistino (K-dino Glodo) **sen ajna motivo.** Oni nur trovis, ke estas tro da mono en la kaso!! Kaj pro tio oni volis malaprobi la financan raporton! Sed K-do **Baleeuw** k aliaj Lilaj K-doj pruvis al la kongreso, ke okazis frakcia aranĝo ekster la grupo, ĉar la mandatita K-do el Lilo, kiu estis voĉdononta kontraŭ la financa raporto, neniel havis la rajton tion fari, pro tio ke la Lila grupo tute ne decidis malaprobi tiun raporton! Aliflanke, kiam oni elektis la prezidantojn de l'kongreso, IPE-ano **Becquart** (Lille) proponis sin mem kiel prezidanton; nur poste oni komprenis, kial. Okazis ankaŭ, ke la nesufiĉa klarigo en la organo « Travailleur Espérantiste » fare de la feder. komitato pri diversaj punktoj estigis miskomprenojn k eĉ kontribuis al fuŝa voĉdono. La Kongreso elektis 10-membran laŭfake respondecan estraron, sidantan en Parizo, kiu per la buŝo de K-do **Pâris** solene promesis al la reprezentantoj de l'grupoj, de nun disvolvi grandan aktivecon. La redakcio-administracio ne plu troviĝas en Ljono (Lyon) — K-do **Ru** (Roux) eksiĝis el sia posteno — sed en Parizo. La Federacia adreso restas: F.E.T., 12, rue de Navarin, **Paris 9-a.**

La akcepto de l'kongresanoj ĉe la Urbodomo estis lumpunkto en tiu ĉi kongreso, ĉar tiu manifestacio permesis fari efikan propagandon ĉe influhavaj personoj de la urba gvidantaro. K-do **Pâris** trafe skizis historion de esperanto k elmontris ĝian neceson, k la respondo de unu urbkonsilanto estis vortoj de simpatianto. Sabatvespere K-do **Pâris** faris antaŭ bedaŭrinde tro malmultnombra ĉeestantaro sian zorge preparitan propagandan paroladon, k K-do **Alberto** prezentis Ĉe-metodan lecionon. La zorgemo de l'organizinta K-do **Baleeuw** agrabligis al la gastoj la restadon, k la Lilaj SAT-anoj montris sin kiel agemaj k lingvokapablaj membroj de nia Asocio. Okazis monkolekto por la hispaniaj K-doj.

22a Kongreso de F.L.E.

En la malnova, pitoreska urbo Gent (Belgio), okazis dum pasko la 22a kongreso. Ĉeestis proksimume 750 Gek-doj.

Reprezentitaj estis 132 sekcioj. La kongreson antaŭiris interfratiĝa vespero, kiu estis grandnombre vizitata. Dimanĉmatene la kongresanaro estis oficiale akceptata en la urbodomo k salutata de la skabenino Boonants. Post tio okazis manifestacio tra la urbo kun muziko k flagoj, kiu faris bonan propagandon.

La kongreso mem distingiĝis per viglaj debatoj k fruktodona diskutado. Okazis tri kunsidoj, en kiuj la jarraportoj de la sekretario, kasisto k Libro-Servo estis aprobataj k vasta proponaro estis pritraktata. La kongreso akceptis proponon enoficigi salajratan funkciulon k elektis por tiu funkcio K-don el la nuna estraro. Komitato estis elektata, kiu serĉos internacian kontakton por instali oficejon pri literatura kontrolo. Unuanime la kongreso decidis sendi simpati-esprimon al la hispanaj K-doj, akompanata de monsumo. Fine oni akceptis rezolucion kontraŭ SELN (la nederlanda sekcio de I. S. E.) por malaprobi ĝian skismigan agadon. Lundmatene okazis SAT-kunveno, sub gvido de la landa SAT-peranto en kiu la aranĝoj por la kongreso de Roterdamo estis pritraktataj.

En la kongreso estis reprezentitaj: La Belga Laborista Partio. Lab. Radio-Amatora Asocio. (Nederlando). Instituto por Lab. Klerigo (Nederl.) ka. Salutleteroj de SAT. Nederl. Ligo de Sindikatoj, Popola Fronto (Valencio), ktp. La sekvonta kongreso okazos dum pentekosto 1938 en Leeuwarden (Nederl.).

SATEB-konferenco en Londono

La konferenco akceptis, la 28-an de marto, jenan proponon unuanime:

«La Laborista Esperanto-Movado (SAT en Britio) sendas al la hispanaj K-doj, pro libero batalantaj, sian solidarecan saluton! Pro la tutmonda proletaro vi batalas; vian kuraĝon ni ne povas tro alte taksi. Al vi ni promesas helpi, per mono k per la disvastigo de la vero, k daŭre ni helpos ĝis la tago de via fina venko.»

La konferenca raporto aperos venontnumere.

SAT savis!

Estas fakto, ke regnestroj dezirantaj paroli kun alilanda samoficano, bezonas interpretiston por interkompreniĝi, dum ordinara manlaboristo senpere povas paroli kun la plej malproksima K-do, dank' al la lingvo universala, kies praktikantoj ni estas.

Bedaŭrinde, pro multaj kaŭzoj — konataj, ni laboristoj ne ofte havas okazon parole interkontaktiĝi kun la samsortano alilanda; malgraŭ tio ni ĉiuj tamen povas spirite, do skribe — havi kontakton kun li pere de la poŝto! Trankvile ni povas starigi la demandon: Ĉu ekzistas iu lingvo nacia, per kiu oni internacie korespondas tiom individuece, kiom per la lingvo esperanto? Sendube ne. Ĉar ne tute ellerninte ĝin, la komencantoj jam klopodas kontaktiĝi kun Gek-doj alilandaj.

Ke en la individua korespondado — aŭ pli ĝuste, en la kontaktiĝado, kaŝiĝas kelkaj solvendaj problemoj, instruas jam delonge la praktiko mem. Iuj siavice skribis plendajn k riproĉajn artikoletojn, kiuj per si mem tamen ne forigis la bedaŭrindajn mankojn, kiuj konsistas el la nerespondo de l'korespond-anoncinto al la skribintoj. Tiu fakto multe seniluziigis la komencantojn-esperantistojn.

La legantoj de «S-ulo» nun povis legi en la antaŭlasta n-o, ke SAT solvis tiun problemon. Per tio ĝi forigas la ĝisnunajn mankojn k do savis la korespond-deziran komencanton el seniluziiĝo. SAT pro tiu iniciato estas modelo al la aliaj organizoj. Gek-doj, ni konsciu pri tiu fakto k ĉiu konsideru kiel sian devon pli forte ol ĝis nun propagandi por SAT inter siaj gegrupanoj k zorgi, ke la **interligilo** ne mortu pro malatento de l'anoj. SAT faris aferon indan je ĉies atento!

G. Kalkman.

UNUA DE MAJO 1937



Montru solidaron kun la hispana laborista klaso!

Novaj klarigoj pri la Korespondoficejo

Eble pro neatenta lego de l'projekto, aŭ pro nesufiĉa precizigo, kelkaj K-doj miskomprenis la funkciadon de la Servo. Notu do: a) Temas pri **individua** interligo, de K-do al K-do, laŭ la deziro esprimita de l'unu k de l'alia. Ju pli da individuaj petantoj diverslandaj estas, des pli sukcese kompreneble la interliganta K-do povas kontentigi la petantojn. Ne povas temi pri individuaj ofertoj direktitaj al kolektivoj aŭ al anonima aro el K-doj. b) Pri la pago: la starigitaj kondiĉoj (2 kuponoj) estas necesaj, ĉar unu el la kuponoj servas por pagi la afrankon de l'letero al la kontaktigoto, dum la dua kovras la kostojn de l'funkciado de la servo, k estas je la dispono de SAT. Tamen, se iu K-do kolektive peras interligopeton por pluraj personoj, li rajtas pagi por ĉiu unuopa nur unu kuponon, aldonante unu ekstran kuponon por la tuta demando. c) La Servo ne estas utiligebla ekskluzive de SAT-anoj, kiel kelkaj kredis, sed **ĉiu laborista esperantisto (organizita aŭ ne) rajtas partopreni en ĝi,** kondiĉe ke li plenumas la pagokondiĉojn. Se ni petas indikon sur la slipo pri SAT-aneco aŭ abono, tio estas nur por statistika celo. Sekve la K-doj bonvolu diligente disvastigadi nian Servon, por ke la sukceso de l'Korespondoficejo, jam nun konstatebla, ankoraŭ pligraviĝu, per pli grandskala utiligado!

SAT-Korespondoficejo

K-do J. LENORMAND,
Rue Jules-Ferry, VITRY-aux-LOGES
(Loiret), Francio.

Al tiu K-do ĉiu **laborista** esperantist(in)o deziranta korespondi kun alilanda K-d(in)o bonvolu sendi:

1) du respond-kuponojn;

2) la sekvantan slipon (aŭ skribaĵon aranĝitan laŭ la **sama modelo,** por faciligi la laboron de l'Peranto!), kiun oni plenigu:

... ...

Slipo N° ......

SAT-KORESPONDOFICEJO

Nomo .... Antaŭnomo ....

Aĝo .... Metio ....

Adreso ....

deziras korespondadi kun

...... ĝis ...... jara Kamarado aŭ Kamaradino (forstreku la senutilan) kies metio estas, laŭeble ...., aŭ ....

... ...

(Bonvole indiku ankaŭ, ĉu vi estas membro de SAT? Ĉu abonanto al «Senn. Revuo»?)

Sub signo de internacia amikeco

Nun mi scias, kion signifas la vortoj: Homa frateco k amikeco! Ĉar fine mi eliris el la malgranda familia rondo k malkovris la mondon. Mi eksciis, ke en aliaj landoj — similaj aŭ ne je la mia — estas homoj, kies moroj k vivmanieroj eble diferencas, sed kies koroj k animoj similas. Tion ni ĉiuj scias; mi ja antaŭe ĝin sciis, — sed teorie, laŭ abstrakta maniero. Dum nun mi tion sentas, profunde en la koro!

Kio do okazis al mi? Ĉu mi travojaĝis la tutan teron, ĉu mi faris mondĉirkaŭiron? Tute ne! Simple, mi pasigis libertempan monaton en internacia centro, kie mi troviĝis inter gejunuloj el diversaj landoj; kune promenante k ekskursante tra la belegaj Pireneaj montoj, — ludante kiel buboj, diskutante pri ĉiaj temoj, — aŭdante interesajn paroladojn, — manĝante, dancante, kantante ktp, en la plej ĝoja kamaradeco; — kune vivante per tiu ĉi kolektiva vivado tiel riĉa k intensa, kiu permesas koni k ŝati unuj la aliajn.

Poŝtistoj Telefonistoj Telegrafistoj

Via fakorgano *INTERLIGILO DE L'P. T. T.* festas sian 15-an eldonjaron k disdonas al ĉiu agema kolego *senpagan abonon* por plena jaro.

Skribu simple vian nomon, fakon k adreson sur simpla poŝtkarto *filatelie afrankata*: vi ricevos la surprizan informon.

Petro FILLIATRE, gvidanto-fondinto de *Interligilo de l'P.T.T.* 324, rue Lecourbe, *Paris XVe.*

La Centro estis organizita de angla asocio « International friendship league » (Ligo de internacia amikeco). Kia do estas I.F.L.? Ne komercista, sed ideala pacista organizo, kiu celas renkontigi (k kune pasigi kelke da tempo) gejunulojn el ĉiuj landoj. Ĝi volas naski ĉe siaj membroj la sentojn pri amikeco k frateco, kiuj, se ekzistantaj en la koro de ĉiuj homoj, igus neebla militon. Ĝi volas komprenigi ilin, ke ili estas fratoj, k ke la homoj, kvankam disigitaj per limoj, havas nenian kialon por malamegi aŭ interbatali. Ĝi deziras malaperigi el la vortaroj, k ĉefe el la koroj, tiujn du vortojn: eksterlandano k malamiko. En unu vorto, kiel SAT, I.F.L. klopodas disvolvi ĉe siaj anoj sennaciecan spiritostaton. Kiel SAT ankaŭ, ĝi estas libera organizo, sen ia partipolitika tendenco aŭ troa partieco, kiu petas siajn membrojn esti toleremaj k komprenemaj rilate al la diversaj filozofiaj aŭ politikaj sistemoj. Pro tiuj samaj celoj de l'du asocioj, mi kredas ke bona IFL-ano estus ankaŭ bona SAT-ano, k inverse.

La Ligo naskiĝis en Anglio dum 1931, kiam junaj pacistaj studentoj invitis 30 germanajn studentojn en vilaĝdomon el vilaĝo nomata « Pachaveno ». Ili interfratiĝis dum kelkaj semajnoj, k per tiu kontakto vere ekkomprenis la sensencecon de l'landlimoj. Baldaŭ aliaj pacistoj, kiuj ŝatis la ideon, grupiĝis k kreis similajn centrojn en Britio. En sekvantaj jaroj, la Ligo kreskis, transmariĝis, tiel ke dum julio k aŭgusto 1936 kvardek centroj funkciis en 11 landoj (helpe de aliaj pacorganizoj): Anglio, Belgio, Svedio, Norvegio, Francio, Germanio, Nederlando, Svisio, Hispanio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio. Ĉiuloke internaciaj grupoj vivadis en atmosfero de juneco, ĝojo, konfido k afabla simpatio.

Mi parolas pri tio al la SAT-anoj, ĉar estas por ili bona okazo iĝi sennaciuloj. En IFL-centroj (eĉ sen translimiĝo, se ekzistas centroj en via lando) vi povas ekkontakti kun samidealaj K-doj (inter kiuj estas esp-istoj) k pasigi internaciajn amikecajn feriojn tute neforgeseblajn. La Centroj estas malfermaj al ĉiuj gejunuloj (16-30-jaraj), kies idealo estas paco, interkomprenigo k fortikigo de l'homeca solidaro. Ne multekosta estas la restado: maksimume 18 fr. frankoj tage, k kolektivaj vojaĝoj estas organizataj. Do, se vi disponas libertempan semajnon, venu sub signo de l'Internacia Amikeco.

Pri pli precizaj informoj skribu esperante, angle aŭ france al K-dino **J. Fournier** (19.769), en **Orlut tra Cherves-de-Cognac** (Charente), Francio (sendante resp. kuponon).

KIAM NOVA KRIZO KOMENCIĜOS ?

Stranga demando, vi diros, leganto. Ĝuste nun, kiam la ekonomia vivo en plej multaj landoj forĵetis la premon de la deflacio. Kiam la devaluacio ankaŭ en la lastaj landoj de la orbloko liberigis la vojon al nova prospero. Tamen en gazetoj k revuoj de ĉiuj landoj oni povas legi, ke oni okupas sin pri la supra demando. Kelkaj landoj jam superas la produktonivelon de 1929. Kelkaj aliaj baldaŭ atingos ĝin. Usono dronas en la oro, kiu pro la grandaj profitŝancoj alfluis el ĉiuj landoj. Oni ja povus eldoni ankoraŭ multe da nova mono garantiita per oro, sed tiam oni nepre enirus inflacion, tial oni dekretas la steriligon (1) de la oro. T. e. granda parto de tiu ĉi oro ne povas servi kiel garantio. Plue la bankoj devos depost la unua de majo plialtigi la rezervojn por siaj investaĵoj. Tiel oni volas eviti kreditinflacion, kiu estus la komenco de nova krizo. Ankaŭ profesoro Verrijn-Stuart de la Utreĥta Universitato deklaris antaŭ du monatoj, ke la kapital-ekspansio post la nuna krizo estas tiom giganta, ke la periodo de prospero estos nur tre mallonga. Certe, ĝis nun la periodoj de prospero k malprospero aperas en pli malpli regula sinsekvo, sed ni nur kontribuus al la ĝenerala fatalismo, se ni konkludus el tio ke ĉiu periodo de prospero neeviteble devas esti sekvata de malprospero. Jam Ruzvelt deklaris al la fiaskinta londona mondkonferenco en 1932, ke Usono volas krei dolaron, kiu post unu generacio ankoraŭ havos la saman aĉetpovon. Tio estus la fino de ĉiuj krizoj.

Kiel ajn oni volas pensi pri la kapitalisto Ruzvelt, ne ekzistas dubo ke li efektive penas plenumi tiun ĉi promeson. Liaj dekretoj k leĝoj depost 1932 pruvas tion. La rimedoj ja estas nesufiĉaj, sed ili montras la direkton en kiu ĉiu registaro — ankaŭ socialista — devas iri, se ĝi volas ekstermi la krizojn k efektive kontraŭbatali la kapitalismon. Cetere ankaŭ J.M. Kens (Keynes), plej fama ekonomiisto nuntempa en Anglio, kies lasta libro pri mono k interezo akiris grandan famon, montras en artikoloj en « Times » de la 12a, 13a k 14a de januaro la rimedojn, kiuj ebligas al registaro k centra banko eviti ĉiun krizon. Kun S. Gezel li opinias, ke oni devas rompi la leĝon de la interezdono, kiu nuntempe regas en la ekonomio, t.e. ke la mono nur tiom longe cir-

LA ELIRO

Matilda de la Torre

La vojo... la terura vojo!

— La stabo malaperis!... Ne plu restas trupoj!... Armeo forestas... k la maŭroj de Franko alvenas, jam ili estas tie...

Denove aperis antikva teruro, la teruro de l'hispana popolo antaŭ la atakema maŭraro dum mezepokaj jarcentoj. Kaj jen la maŭroj, kiuj venas! Certe ili ne estas maŭroj, sed la hispana popolo ĉiam nomas tiel ĉiujn fremdulojn, kiuj profanas ĝian grundon.

En mediteranea, mirinda nokto, ĵus naskita luno arĝentis la ĉielon de Malago. Ne estas lumoj en la urbo, ĉar la teruro vastiĝis tiel rapide, ke neniu atentas pri tio. Ankaŭ ne ekzistas fusiloj por la laboristoj; ilin havas kelkaj miloj da viroj, kiuj forkuras, devigataj de la perfida stabo, kiu ekkriis: « Savu sin, kiu povas! »

Ne estas ia lumo, krom tiu de la Luno.

Senĉesa bruado densiĝas en la urbo k kreskanta tajdo de teruro neebligas ĉiujn k'arigi al la najbaro la veron; nur oni antaŭsentas alproksimiĝon de homa kastastrofo, kiun la viroj ne povas eviti. Kiam la maraj aŭtoritatoj intencas trankviligi iun k ordigi ion, ili malsukcesas; neniu kapablas ion kompreni. La cerboj, varmigitaj per sciigo pri tuja danĝero, nur avidas unu solvon. Forkuri! Forkuri rapide!

Miloj da freneziĝintaj virinoj aktive sin okupas pri tragike absurdaj aranĝoj por forkuro; ili atingas nenion utilan. Kun senkonsola plorado ili penas savi la idojn el danĝero. Multaj el ili estas militaj vidvinoj; eĉ kelkaj ricevis hieraŭ la koncernan sciigon. Iliaj piedoj doloras pro dumonata forkurado tra la stratoj, celante eviton je krima k ofta bombardado.

En la malriĉaj dometoj ĉie postrestas sangaj makuloj, truoj en la muroj malfermiĝas al ĉielo kvazaŭ angore petantaj al Dio iom da atento pri mondaj aferoj...

———

Surstrate la mizera amaso nur petas ebiojn eliri, forkuri el « tio, kio venas ». Ĉies cerboj ekscitiĝas en klara rememoro pri freŝaj okazintaĵoj; neniu forgesas la sekvojn de faŝista regado: la ekzekuta muro kiu tuj funkcios. Ĉiam okazis same k tial la popolo forkuras, neniu deziras esti kaptita. Faŝismo ne havas sufiĉan monon por nutri la hispanojn k simpligas la aferon per amasaj fusilmortigoj. Mortinta stomako ne manĝas. Viroj k virinoj tion bone scias. Faŝista triumfo parolas al ili pri tombeja putriĝo...

En la milda nokto de l' ĵus naskita luno aperas la fatalo: Ne estas veturiloj! Kaj dum tagiĝo komenciĝas la eliro, drameca eliro de homaj riveroj, eliro laŭ praa aspekto, kiu trapasas la pordojn de Malago, la urbo de ora legendo...

———

La Respublika Nacia Gvardio de Malago konsistis el restaĵoj de l' malnova Civil-Gvardio. La respubliko, kiu ilin akceptis tro facilanime, kare pagis tiun eksperimenton. Krom maloftaj esceptoj, tiaj gvardianoj el malnova gvardio neniel utilas. La eksperimento kostis pli da lojala sango ol kvar perditaj bataloj.

Tuj kiam ili eksciis pri tio, ke la fremdaj trupoj alvenantaj estas multenombraj k amase venas maŭroj, fremdlegianoj, italoj k germanoj, ili reakciis laŭ sia malnova monarkia historio. Ili agis strange. Ili sciiĝis rapidege, kiel jezuitoj, ke la militestroj forlasas la urbon sen batalo; silente iris al kazerno, eltiris (neniu scias el kie) la malnovajn trikornajn ĉapelojn k surstrate marŝis por renkonti Frankon.

Neniun ili pafis. Nur ilia pasiveco anoncis al enloĝantoj, ke la urbo... denove apartenas al la civil-gvardio! La sinteno

kuladas, kiom longe la sufiĉe alta interezo logas. **Fiz.**

(1) Ne-krepovo.

Ĉu tiel oni preparas Unuecon ?

Per ĉiaj rimedoj malutili al SAT! tia restas la devizo de l'IPE-anoj, hodiaŭ kiel en la tempo de l'ek-skismigo. Nenio ŝanĝiĝis. Kaj tiu ekkono diktas nian sintenon. Jen nova dokumento vere edifa :

SAT-ano Roig el Barcelono sendis al ni, la 2-an de marto, jenan informon : « Mi vidis leteron de la IPE-ano M. Boubou (1), kiu sendis al Barcelona IPE-ano jenajn liniojn : « Mi ĵus sciiĝis, ke SAT-prezidanto Glodeau (2) en Parizo deklaris publike, ke li neniam donis, donas aŭ donos monon por Hispanio... » Ĉu vere la K-do Glodeau diris tion aŭ estas manovro de Bubu ? Mi tre dankus vian respondon : **A. Roig** (adreso, matrikulo). »

La Pariza grupo de F.E.T., kies membro estas K-do Glodo, en sia ĝenerala kunveno de 8. marto, post lego de l'supra poŝtkarto, **unuanime** protestis kontraŭ tia kalumnio, deklarante ke ĝi ne kredas K-don Glodo kapabla fari tian deklaron. La sekretario de l'grupo estis komisiita peti al K-do Bubu informon, kie k de kiu li aŭdis tiun aserton.

K-do Bubu, la « okulo de Orleano », respondis jene (14-III) : « K.K. Mi rapidas respondi vian leteron. Mi tre miras, ke en FET-kunveno oni pritraktas aferojn, kiuj koncernas nur SAT k IPE, k enhavon de letero mia al privata hispana K-do. Tamen mi povas konfirmi, ke efektive iu pariza K-do konigis la aluditan informon. Mi ĝojos, se la informo estas nevera k nur kalumnia. Cetere mi diru, ke la informon mi nerekte ricevis. Mi mem skribos al la informinta K-do el la pariza grupo, k se tiu K-do mensogis, mi tuj sciigos al vi lian nomon k informos mian korespondanton en Barcelona. Mi aldonas, ke mi posedas la paperon sur kiu la informinto skribis k ke tre precizajn detalojn ĝi enhavas. Kun frata saluto via **M. Boubou.** »

Nu, eĉ se la akuzo ne estus simpla kalumnio, sed baziĝus sur fakto, al kio utilus do disvastigi ĝin en Hispanio ? Ĉu al la unueco ? Ĉu al kuraĝigo de l'hisp. K-daro ?

La legantoj havos sian opinion pri la « unuecema » celo de l'denuncinto.

(1) Prononcu : Bubu.
(2) K-do Glodo (Glodeau) neniam estis, nek estas prezidanto de SAT.

Diskutejo

Aldone al « Idealistoj aŭ Realistoj »

El la respondo de K-do N. B. al miaj rimarkoj en la januara « S-ulo » mi ĝojas konstati, ke la opinidiferencoj inter ni ne estas tiel grandaj, kiel antaŭe mi pensis. Mi eĉ povas ĝis ia grado konsenti kun lia takso koncerne la rolon de kolektiva korespondado. Laŭ mi la tielnomata PEK-laboro, kiu jam estas en la statuto de SAT kiel unu el ĝiaj celoj (vidu paragrafon 1, ĉ : « servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT ») havas ĉefe *eksperimentan* valoron. La konstruisto de teknika ilo ĝenerale ne uzas sian propran maŝinon. Li provas vendi ĝin al kapitalisto. Sed por konvinki la kapitaliston, ke sia maŝino havas valoron, li devas montri al la kapitalisto, kiel la maŝino povas esti utiligata. Li devas uzi la maŝinon mem laŭ eksperimenta, sed ne industria skalo. Tion mi ofte observis en mia metio, en kiu ni uzas pulvorojn. Ofte venas reprezentantoj de firmoj, kiuj fabrikas muelilojn, k montras al ni specimenojn de pulvoroj, produktitaj en iliaj mueliloj. Kiam temas pri tre multekosta muelilo, ili eĉ ofertas fabriki por ni la pulvorojn el niaj propraj krudaj materialoj.

Pardonu la analogon, K-doj ! Sed se ni komparas la laboristan movadon kun firmo, kiu bezonas maŝinon, devas esti klare, ke por konvinki niajn ne-esperantistajn K-dojn pri la valoro de esp-o, ni devas uzi ĝin laŭ eksperimenta skalo. Kiam tio ne sufiĉas, ĉar ili eble opinias, ke la lernado de esperanto estas tro multekosta en tempo, ni devas oferti al ili ke ni faru la laboron por ili — same kiel la fabrikantoj de la multekostaj mueliloj ofertas fabriki la pulvorojn. Finfine ili mem decidos lerni la lingvon, same kiel la kapitalisto finfine « ŝparos » la monon por aĉeti la muelilon. Mi konsentas kun K-do N.B., ke tiu PEK-laboro ne havas multe da utilo en si mem, sed laŭ mi ĝi havas gravan propagandan valoron. Tion oni eĉ agnoskas en SAT, ĉar en la paragrafo 2-a de la Regularo pri la SAT-frakcioj, rilate al la propagando de esp-o en partioj, ni legas « Ĉar tiu ĉi propagando okazas unuavice per elmontro de la praktika valoro de esperanto... »

Cetere mi ne volas subtaksi la rolon de esp-o por ebligi la « spiritan trafluadon super ĉiuj ŝtatlimoj », pri kio parolas K-do Lanti. Fakte, kiam mi faras propagandan paroladon pri esperanto, mi ĉiam substrekas, ke en literaturo, scienco, muziko ktp, ĉi tiu spirita trafluado jam okazis eĉ sen esperanto. La alpreno de esp-o ebligos, ke la nunaj mizeraj fluetoj trans la bariloj de la landlimoj transformiĝos en profundajn riverojn de internaciaj interrilatoj, kiuj finfine forbalaos tiujn barilojn, kiuj malhelpas la kunfluon de ĉiuj homoj en unu harmonian tuton.

Finante, mi alvokas, al ĉiuj K-doj, ke ili memoru ke la propagando de esp-o devas esti multflanka k multfaka. Ili ne trotaksu iun metodon je la escepto de la aliaj. Mi esperas, ke aliaj

---

de tiuj gvardianoj, kiuj fusilon en brako trankvile rigardadis la teruron de la urbo, estis io karakteriza. Eble ili ne estis certaj pri la eniro de Franko, k pro la dubo ili nur observis la forkurantojn...

Tagiĝis en Malaga kamparo k la suno kun mirego ekvidis tiun amason marŝantan tra la vojo, antaŭen, al Almeria.

La vojo... la terura vojo ! Kial estas tiel longaj la vojoj ?

En la monstra procesio, formita el pli ol 50 mil estuloj, marŝis tremantaj maljunuloj, kiuj avidas la vivon kun angoro... infanoj, kiuj mantrenas plorantajn infanetojn... dekmiloj da virinoj kiuj spiregas en la deklivoj... Kaj la Suno supreniras en la ĉielo polurante la glatan surfacon de la vojo. Malsato k soifo, dormemo k teruro ! Ĉio miksiĝas, sed necesas marŝi... Nepras marŝi !

Alveninte sur monteton, la unuaj elirintoj rigardas malantaŭen. La vojo estas nigra rivero serpentumanta malrapide al Almeria. Polva nubo ŝvebas super la amaso, dum per raŭka voĉo miloj da buŝoj plendas.

Sciigoj el la urbo trakuras la vicojn kun elektra rapido. Unu el ili devigas ĉiujn al malantaŭa rigardo :

— Vidu... fumo... fajro...

— Estas la petrolbasenoj... Ne ! Estas la urbo !

Eksplodoj aŭdiĝas sinsekve.

— Estas la ŝipoj ! Oni dronigas ilin !

Vere okazis tiel. Maraj aŭtoritatoj penis malpliigi la katastrofon nuligante valorajn elementojn eble utiligotajn de fremdaj invadintoj.

Sed la eliro ne povis halti ; novaj grupoj pelas la antaŭajn. La homa rivero plilarĝiĝas, dise elvojiĝas k senbride ĉien invadas, apud la vojo.

La nokto alvenas post longa penado k malgraŭ ĉies deziro alveni malproksimen, miloj da virinoj, infanoj, maljunuloj k malsanuloj falis teren pro laco, malsato k soifo. Miloj da ŝiraj krioj petas panon, akvon ; sed nenia homa potenco povas helpi, la mizero estas absoluta.

Kiam la luno aperas en horizonto, nur ĝi vidas kamparon, sur kiu kuŝas dekmiloj da homaj estuloj, kvazaŭ mortintaj. Sed ili dormas, k eble revas ne sciante ke fremiaj hordoj jam eniris la urbon. La densa, peza dormado malhelpas al ili aŭdi la pafojn de faŝistaj patroloj, kiuj ekzekutas sur la stratoj. La ekzekutitoj certe suferis malpli ol tiuj malfeliĉaj forkurintoj...

Ho, ve, malfeliĉuloj, vi kiuj dormas fideme, ne atentinte eblan persekuton ! Ĉu vi ne scias per kia rapido flugas la aviadiloj ? Antaŭ ol tagiĝis, la vekiĝanta amaso perceptas tragikan zumadon... la zumadon de Morto !

La Morto serĉas ilin ; k tiu laca amaso, kiu ne havas fusilojn, nek panon, nek akvon... vidis la flugantajn murdantojn, je la servo de perfido...

Freneza kriado sendas al vento plej teruran deliron de apokalipso... Ĉiuj diskuras en senorda fuĝado, al neekzistantaj rifuĝejoj. Nombro da mortintoj k vunditoj kreskis, kreskadis, dum kanajlaj aeroplanoj senkompate mitralis la malsatajn k nudajn forkurintojn. Multaj el ili estis liberigitaj el plensufera vivo mizera...

La vojo ! Senfina vojo de morto k teruro !

Almeria, malriĉa urbo, ne havanta rimedojn por alfronti tian malfeliĉon, komencis ricevi, tiun nokton, la unuajn grupojn da forkurintoj. Grandega ondo da senfina doloro invadis la urbon. La forkurintoj, fuĝintaj el italaj k germanaj aviadistoj, senĉese alvenas en grandega amaso kiu invadas stratojn k dormas sur la pavimo... La hordoj de Franko tion scias k tial ili vizitas nokte la urbon Almeria, kies stratoj estas semataj per bomboj...

Eŭropo ! Eŭropo ! Ĉu vi forgesis la marojn de sango, verŝitajn dum jarcentoj por firmigo de l'homaj rajtoj ? Atentu, Eŭropo ! Via indiferento ne protektos vin, ĉar la faŝismo havas malindulgan programon !

Kaj vole, nevole, patrino Eŭropo... en Almeria decidiĝos via destino !

Elhispanigis, ZIUL (19318).

K-doj eldiros siajn opiniojn pri la plej bonaj rimedoj, kiujn ni devas uzi por propagandi la lingvon — nia progreso estas ja, milde dirite, malrapida. Tiucele ili havas en SAT liberan diskuteblon. Kun surprizo mi legis en la decembra « Socialisto » de I.S.E., ke « diskuto pri tiuj problemoj dum kongresoj k en la gazetaro de SAT ne estas permesata ». Ĝis nun mi tion ne spertis, kvankam mi ofte rekte — sed mi esperas ne akre — kritikis la opiniojn de SAT-gvidantoj, tiel en kongreso kiel en la gazetaro. Guste en tiu diskutlibero kuŝas la ĉarmo de SAT. *Vilhelmo Makoli.*

Red Noto: Ni volas subskreki, ke la kolonoj de niaj organoj ĉiam estas malfermaj por serioza, sincera diskutado pri la aktualaj problemoj de la esp-a, kiel de la ĝenerala lab. movado. La sola postulo estas, ke la K-doj diskutadu *tolereme, senpasiece,* laŭ la spirito de la unua statut-paragrafo.

Persone mi opinias, — k mi ne pensas stari izola, — ke SAT estas, dank' al utiligado de esp-o, *unika* kultur-organizo kun antaŭe ne ekzistintaj ebloj por la proletoj tutmondaj interalproksimiĝi, ekvidi novajn horizontojn, surpaŝi vojon al nova kulturo universala. En tiu ebligo kuŝas laŭ mi la ĉefa altirforto de nia organizo. Por nia movado ĉiam la esenca problemo estis k estas tiu : kiel konservi en niaj vicoj la finlernintojn de l'esp. kursoj. Kaj tio okazas nur, se la finlerninto *aŭ* estas tre idealista homo, kiun kontentigas mem la « metio » de propagandisto en nia movado malmulte disvastigita ; — *aŭ,* se la movado *jam nun* povas prezenti al li ion konkretan, pozitivan : k tio estas la kultura agadkampo de SAT.

Sekve, ĉar ni ne povas kalkuli, ke ĉiuj kursfinintoj volas iĝi siavice propagand-apostoloj, sed ke la plejparto atendas ian realan utilon (certe ne materialan, sed almenaŭ spiritan) el la scipovo de esp-o, tial necesas organizo kia estas SAT, kun originala spirita vivo rezultanta el la esperantisteco. *N. B.*

Tra la Esperanta Gazetaro

Eĥoj el k pri Hispanio

Estas klare, ke la hispania batalo ne lasas malvarmaj la anojn de l' « verda popolo » k precipe la prolet-esperantistojn. Bedaŭrinde *Popola Fronto* en sia 10-a n-ro esprimis sentojn naskiĝintajn en la pasio de l'batal-atmosfero, per vortoj pri malvarma blovo : kvazaŭ nesufiĉo da solidarosento estas esprimata en la propra gazetaro, tiu de SAT! La eraro de niaj valenciaj amikoj kuŝas en tio : meti sur saman nivelon la *agitan* (k speciale agitcele kreitan) revuon « P. Fronto » k la edukcelajn SAT-organojn. La taskoj estas ja vere malsamaj! Tro granda ŝajnas al ni la tragedio de l'sanga lukto, ol ke ni emus per palaj vortoj ĉi tie skizi nian argumentadon. La homa parolo ŝajnas al ni tute malplena k nesufiĉa, por varmigi korojn k tremigi ilin por afero, kiu nin ĉiujn ĝis fundo emocias depost la 19. julio, k ĉiutage denove...

Ni ricevis du-paĝan informbultenon dissenditan de la Lab. Esp. Grupo en *Teraso* (ap. Barcelono), adr.: *L. E. E.,* Milicies Catalanes 56, *Terrassa,* kun alvoko por helpo al la hispania proletaro.

El artikolo de B.W. en « La ruĝa Heroldo », organo de la Roterdama sekcio I-a de FLE, n-o 24, ni citas jenan meditigan alineon : « Frapantan ekzemplon de naciismo (aŭ eĉ provincismo) ĉe la amaso ni trovas en Hispanio. La katalunoj tute ne sentas sin hispanoj, aŭ pli bone, ili ne formas kun la hispanaj armeoj unu kompaktan forton, kiu kontraŭstaras la malamikon. Vere, oni en Hispanio ne batalas unuigite. Legu « Popola Fronto »n; nenion vi trovos pri Katalunio. Sed la organoj, kiuj eldoniĝas en Katalunio, mem entenas tute aliajn, ofte kataluniajn artikolojn. Do, en Hispanio regas eĉ la provinca ŝovinismo, antaŭulo de la nuna naciismo. Kaj certe ne plej malmulte ĉe la laboristaro ».

En la « Informbulteno CNT-FAI » (n-o de 20.3.37) ni trovas jenajn konstatojn : « La decidaj momentoj de l'hispana tragedio estas alproksimiĝantaj. La internacia faŝista reakcio nodas la ŝnuregon ĉirkaŭ la kolo de la revolucio. La hipokrita k kaduka demokratio kun vualitaj okuloj marŝas al sia bankroto. La parolaĉema k malnobla diplomatio ludas sian lastan farson, nomita « kontrolo ». » Kaj oni starigas jenajn amarajn demandojn : « Sed kion faris la internacia laborista klaso? La militfabrikoj en Germanio k Italio pro kio ankoraŭ ne estas malfunkciigitaj? Ĉu la transport-laboristoj rifuzis veturigi soldatojn k materialojn al Franko ? Ĉu la saboto, la striko, la ĝenerala striko estas aplikitaj? Kion faris por la revolucio la « tredunioj » k la 5 milionoj da organizitaj laboristoj de la franca C.G.T.? Kion faris la tutmonda proletaro?... » Kaj ĝi vokas la laboristojn al senprokrasta k decidiga agado.

Pioniro en Usono

Ni ricevis la unuan n-ron (februaro) de monata organo de L.E.A. de Nord-Ameriko, kiu estas bonaspekte multobligita k ŝajnas al ni taŭga propagandilo en la manoj de l'usonaj aktivuloj lab. esperantistaj. Teksto ĉefe anglalingva. Kroniko. Leciono. Kurs-anoncoj. Propagand-artikolo k paĝo pri Hispanio. Adreso : P.O. Box 100, Station « K », *New York City* (U.S.A.). Abonprezo nemontrita.

Konsideroj pri « Esp-o en la lernejojn ! »

La problemo pri enkonduko de esp-o en la lernejojn okupas ankaŭ la estonajn esp-istojn, kiuj esprimas siajn opiniojn en « Informoj ». En la n-o de marto VeRo avertas kontraŭ mispaŝoj k troa optimismo. Li opinias, ke en Estonio estus sufiĉe malfacile nuntempe enkonduki esp-on. Li konstatas, ke la nivelo de la lernantoj estas ĝenerale tre malalta, k ke eĉ se oni atingus instrui esp-on dum 2-3 jaroj po 2-3 lecionoj semajne al lernantoj 9-12-jaraĝaj, la rezultoj verŝajne estos malgrandaj « En Estonio ekzistas ĉ. 1230 elementaj lernejoj, do ni bezonas por la instruado minimume 1000 instruistojn, t. s. la saman nombron, kia estas la nombro de la organizitaj esp-istoj en Estonio. De kie ni prenu ilin?... »

Ne atendu tro rapidajn progresojn !

Havu paciencon ! rekomendas H. H. Kürsteiner en la n-o 10. marto de ESPERANTO de U.E.A. al iuj fervoraj esp-istoj, kiuj trovas, ke la progreso de nia movado ne estas kontentiga. « Kritiko, kiu estas ĉiam facila, malatentas tie la spertojn faritajn de aliaj movadoj, ja eĉ tiujn de potencaj institucioj kun apogo per pli realismaj faktoj ol la niaj. Kiun gigantan aparaton ekzemple posedas la diversaj eklezioj por kunteni la homojn k konverti novajn, kiom kolosaj estis la montegoj da penoj, da mono, da papero, kiujn bezonis politikaj partioj por atingi fortan pozicion en la socia vivo... » Li konkludas, ke en la iloj k manieroj de nia propagando ne multe estas ŝanĝinda aŭ ŝanĝebla.

RECENZEJO

Duope ricevitajn librojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

JUL. GLUCK K J. H. J. WILLEMS : LA VERBO EN ESPERANTO. Teorio k praktika uzado. Eld. W. J. Thieme & Cie, *Zutfen,* 1937. Prezo : 0.65 guld. Form. 15 × 23 cm. 48 paĝoj.

Jen tre detala k bone aranĝita libreto pritraktanta la verbon en esp-o kun speciala atento pri la malsimplaj verbformoj. La aŭtoroj estas gratulindaj pro la klara prezentmaniero k pro la elĉerpo de l'temo ; ne restas dubaj punktoj.

JAUME GRAU CASAS : LA LASTA POEMO. 32 pĝ. Form. 10,5 × 15 cm. Prezo ne montrita. *Barcelona,* 1936.

La libreto entenas diversajn versaĵojn de l'konata aŭtoro, kreitaj en la lastaj jaroj, inkluzive la salutpoemon al la Valencia SAT-kongreso. Ĉiuj poemoj en tiu kolekto estas tre lirikaj k prikantas plej diversajn temojn.

VIENA FOIRO, 7.-14. de marto 1937. Dukolora faldprospekto esp-lingva.

D-ro PFEFFER : VORTARETO GERMANA-ESPERANTA : 32 pĝ. en la formato de l'Ĉefeĉ-ŝlosiloj. Eldonis « Reinhold-Verlag ». Mendojn al Intern. Esp. Muzeo, Neue Burg, *Wien I.* Prezo : 1 resp. kupono por 5 ekz-oj.

Korespondado

Simpla trilinia anonceto kostas 4.50 fr. fr.

NEDERLANDO

K-dino deziras kor. kun ekster-eŭropaj Gek-doj. Resp. garantiata. Adreso : A. *Vet-Alexander,* G. v. Wijnkade 26, *Maassluis.*

Abelisto deziras korespondi kun sama persono en Rusio, kiu vizitas la erikejon. Adreso : *J. Rentenaar,* Heer Gillesstr. 24 a, *Rotterdam-Z.*

Filatelisto dez. kor. kun Gekd. el ĉiuj landoj. Nepre resp. Adr.: *J. Grüne,* Singel 5, *Medemblik.*

22-jara junulo dez. koresp. kun Gek-doj el ĉl., pĉt. Resp. garantiata. Adreso : K-do *W. Hartman,* Harstenhoekplein 11, *Scheveningen.*

Dek kursanoj deziras korespondi kun gekursanoj ĉiulande. Adr.: *A. v. Rosmalen,* Lekstr. 26 B, *Schiedam.*

La R'dama sekcio 14-a dez. kor. kun Gek-doj ĉl. pĉt. Respondo garantiata. Skribu grandnombre al K-do *A. de Smit,* Eleonorastr. 49 b *Rotterdam C.*

Dudekjara esperantistino dez. kor. kun tuta mondo. Resp. garant. Adr. : *G. Multenberg,* Orderparkweg 42, *Apeldoorn.*

K-do *J. M. Timmerman,* Hooidrift 88 A, *Rotterdam-W.,* koresp. pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Resp. gar. de la sekcia SAT-peranto.

JAPANIO

Gefratoj *Uakamacu.* Nada P.O. Box 13, *Kobe,* dez. koresp. k interŝ. PM, gaz., kun Gek-doj el ĉ.l. Certa respondo.

Memornoto

REPRESIS EL « S-ULO » : *La Nueva España,* B. Aires, 24.1. (El Portug.)

REPRESIS EL « S. R. » : *Nynäshamn Posten,* 12.3., *Folkets Dagblad,* 13.3. Nynäshamn, (naskiĝtago en Germ.)

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS: *Signalen,* Stokh., 11., 18., 25.3., 1.4. (kurso); *JEUNES,* Paris, marto; *La Voix Libertaire,* Limoges, 13.3.; *La Patrie Humaine,* Paris, 26.3.; *Tipografa Bulteno,* Paris, marto. — En judlinga taggazeto « Naie Presse » (Paris) Elio Males (Wajsband) publikigis la 3.1. grandan artikolon pri esp-o k la vivo de Zamenhof. La artikolo havis bonan sukceson.

MEMBROJ, pagantaj kvaron-jare pere de loka PERANTO, faciligu al tiu K-do lian taskon! Pagu akurate, ĝustatempe! Ja la 1/4- k 1/2-jara pagmaniero estas favor-aranĝo, kiun ni enkondukis en SAT nur pro la ekonomia krizo k kiu pli ŝarĝas nian administracion. (ADMIN. de SAT.)

Poliaj K-doj ! Akceptis la peradon de kotizoj ktp. K-do *Albin Piotrowski,* Czarnowiejska 30, Krakovo.

BOLENFRASAT (bolŝ. leninista frakcio). — La sekretario *adresŝanĝis.* Nova adreso por koresp-aĵoj k mono : Suzanne Charpy (por Oĉjo), 3, rue de la Fidélité, *Paris* 10. (Oĉjo).